

# Kataluna Esperantisto



NUMERO 344 (110)  
KVINA EPOKO  
OKTOBRO-DECEMBRO  
2007

**Aŭtuna renkontiĝo**

**Propono de principaro**

**Kaj Tiel Plu en debato**

**Aŭtomata tradukilo  
ekfunkcias**

**Eldon-furoro**

**Kampanjo por nuligi  
honoradon al Franco**

**Studi sociològic  
sobre els esperantistes**

**El gaèlic a Irlanda**

**Genocidi intellectual  
a Àfrica**

Pàgines 13 i 14

## Trilingüisme sostenible?

*El curs 2007-2008 ha començat amb l'impuls de dues qüestions lingüístiques que, d'ací a uns quants anys, poden tenir una repercussió profunda en la societat catalana: la tercera hora de castellà i l'inici del pla d'anglès, amb la intenció que l'any 2015 tots els alumnes de setze anys que surtin dels instituts sàpiguen català, castellà i anglès. Al mateix temps, s'anuncia també que els nous plans universitaris hauran d'incloure explícitament un reforç de l'anglès per a augmentar, s'explica, la competitivitat dels nostres universitaris. Les mesures han sorgit des d'administracions diferents –la primera impulsada pel govern espanyol, les dues altres pel Departament d'Ensenyament–, però convergeixen en un mateix resultat: les hores dedicades a l'ensenyament d'idiomes s'incrementaran i, d'alguna manera, les mesures vénen a sancionar la força de les llengües hegemòniques enfront de les més petites. És realment així? El programa lingüístic que se'ns proposa comporta només avantatges? Hi ha alternatives a allò que es comença a posar en pràctica? Les respostes presenten aspectes múltiples, però hi ha algunes claus sobre les quals no s'acostuma a reflexionar.*



CHRIS BOESE

## Ĉu historio aŭ malhistorio?

**La nuna generacio de aktivuloj zorgas adapti la ĉiamajn idealojn de paco kaj egalrajteco de la esperantismo al mesaĝoj, prezentoformoj kaj agad-metodoj kiel eble taŭgaj por influi nian nuntempan socion, ne perdante la revolucian karakteron de esperanto**

**R**enato Corsetti taksas en *La Ondo de Esperanto*, ke la plej malpozitiva aspekto de la jaro 2007 estis “la eksternorma interesiĝo de esperantistoj pri historiaĵoj”. Laŭ li “estas orgio de historio en la movado, kiu en ekonomie evoluintaj landoj transformiĝas de movado de batalantoj al movado de eksbatalantoj”. Simile, kvankam tute alitone, konstatis, la kreskon de historiaj studoj pri la esperanto-movado Humphrey Tonkin en sia raporto pri la eldonaĵoj pri esperanto en antaŭnelonga numero de *Language Problems & Language Planning*. Kaj efektive, laŭ tiu tendenco, ĉi-jare KEA planas eldoni du novajn tekstojn pri la historio de la esperantismo en Katalunio, fare de Francesc Poblet.

Tiu agado, se ĝi ne estus balancita, estus ja signo de malsano: homgrupo rigardanta nur malantaŭen montras malaltan takson pri sia hodiaŭo kaj mankon de fido pri la estonto. Tamen, se oni konsideras, ke temas pri seriozaj, fakaj studoj je universitata nivelo, ni povas ĝoji, ke esperanto eniras novan fakon en la fakultatoj pri sociaj sciencoj. Kaj se krome ni legas, ke KEA samtempe enkondukas esperanton en la plej modernajn teknologiojn

per la evoluigo de aŭtomataj tradukiloj en la internacian lingvon, ni povas dubi, ĉu la kritiko de la eksprezidanto de UEA estas troigo. Eĉ plie: laborgrupo de KEA malrapide, sed diligente kaj tre serioze pretigis ideologian dokumenton, kiu montras la taŭgecon de esperanto en nia nuntempa, moderna, multkultura kaj fulmrapide ŝanĝiĝema socio de la 21a jarcento. Esperantistoj ne rigardas nur malantaŭen, sed interesiĝas pri siaj radikoj kaj tradicioj por firmigi siajn poziciojn.

Estas fakto, ke en la esperanto-komunumo, kiel en ĉiuj kolektivoj, konkuras fortoj modernigaj kaj tradiciemaj. Ni devas ĝoji pro tio, ke la nuntempaj aktivuloj serioze interesiĝas pri la agado de siaj antaŭuloj, kio montras ilian respekton kaj estimon por niaj veteranoj. Kaj ni devas ankaŭ ĝoji pro tio, ke niaj pli aĝaj samideanoj alte taksas la laboron de la nuna generacio de aktivuloj, kiuj zorgas adapti la ĉiamajn idealojn de paco kaj egalrajteco de la esperantismo al mesaĝoj, prezentoformoj kaj agad-metodoj kiel eble taŭgaj por influi nian nuntempan socion, ne perdante la revolucian karakteron de esperanto.

*Hektor Alos i Font*

En ĉi tiu numero kunlaboris: Anna Raventós, Chiara Fortunato, Darío Rodríguez, Éric Colignon, Ferriol Macip, Francesc Poblet, Gerard Escuer, Guillem Sevilla, Joan Marimon, Josep Enric Peres i Blesa, Llibert Puig, Lluís Aragay, Marc Galabert, Martí Guerrero, Mon Cardona, Ramon Perera, Sjoerd Bosga.

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008  
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Katalunio/Katalunio  
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat  
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2007: individua abonanta membro, 40 eŭroj; individua subtenanta membro, 80 eŭroj; individua dumviva membro, 800 eŭroj; kolektiva membro, 80 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.  
Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona agència 461 Sabadell, kontonumero: 2100 0461 90 0200055053  
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053  
Konto UEA: kaea-b  
CIF: G-58338567

Imprès a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatoj: Gemma Armadans, Gerard Escuer, Ramon Perera.  
Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Luz Vázquez, Òscar Puig.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

### Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: kej@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/kej  
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Banko: Caixa d'Enginyers, kontonumero: 3025 0002 47 1433276794  
IBAN: ES89 3025 0002 4714 3327 6794

Estraro: Prezidanto: Jordi Aromí; sekretario: Carles Verdugo; kasisto: Xavi Battle; informado: Guillem Sevilla kaj Pau Climent; esperantaj rilatoj: Joan Català; ne-esperantaj rilatoj: Roger Sanjaume.

## Ĉarma renkontiĝo en Capellades

La pasinta aŭtuna renkontiĝo kaj kaŝtanfesto organizita de KEA kun la subteno de KEJ okazis en la kastelo de Cabrera, en Vallbona d'Anoia, du kilometrojn for de la stacidomo de Capellades. Oni elektis tiun lokon, ĉar dum la jaro kelkaj homoj esperantistiĝis en la regiono kaj bedaŭrinde ne eblis organizi la renkontiĝon, kiel kutime en aŭtuno, en Nord-Katalunio.

La kastelon ĉirkaŭas arbaroj kaj naturo, eĉ oni povis rigardi la monton Montserrat inter la pejzaĝo. Fakte, la situo estis tre taŭga por fari multajn interesajn ekskursojn tra la montaro.

Krom lokanoj, partoprenis homoj el Pollando, Francio, Valencilando, Eŭskio kaj Okcitanio. Pli-malpli 30 homoj kun tre diversaj aĝoj. La plej juna havis sep jarojn kaj la plej maljuna sepdek. Tiu diverseco kontribuis al bona disvastigado de la lingvo inter la infanoj, kiuj vere amuziĝis en la esperanta etoso. Inter la partoprenantoj estis Flo, responsulo de la disko-eldonejo Vinilkosmo, kaj Przemysław, pola volontulo laboranta en Tuluzo: tre taŭgaj homoj por igi la renkontiĝon interesa per preleĝoj.

La gastejo disponis tri ĉambrojn por dormi, ludejon, manĝejon kun kameno kaj kuirejon tre bone ekipitan. Tio permesis, ke ĉiufoje la manĝaĵo estis pretigita de malsama laborgrupo kun la gvido de Brian, kiu jam organizis la kuiradon en la somera Sen-Programa Renkontiĝo kaj ege sukcesis, ĉefe ĉar tio malatigas la kotizojn kaj plialtigas la kvaliton de la menuo.

Kiam la nokto jam proksimiĝis kaj la plimulto de la partoprenantoj jam alvenis, ni profitis la kamenon ekbruligante la lignon; tiam, komenciĝis la vespermanĝo kaj la kaŝtanfesto. La celo de la renkontiĝo estis amuziĝi kune kaj montri eron de la kataluna kulturo al la eksterlandanoj. Por tio, la vespermanĝo konsistis en tipa kataluna manĝaĵo: pano trempita per tomato kaj oleo kun kolbasoj, aŭ fromaĝoj por la vegetaranoj. Tion akompanis bek-kruĉoj de biero kaj vino. Fine, kiel deserto estis la tipaj frandaĵoj de la tago: kaŝtanoj, batatoj, la katalunaj dolĉaĵoj *panellets*, kaj por trinki, muskatvino.



Ĉiufoje la manĝaĵo estis pretigita de malsama laborgrupo kun la gvido de Brian, kiu jam organizis la kuiradon en la somera Sen-Programa Renkontiĝo

La nokton etosigis tri gvidantoj de infangrupoj, kiuj organizis serĉ-ludojn por ridi kaj amuziĝi kune, tradiciajn inter skoltroj. Poste oni povis elekti inter partopreno en la jam tipa ludo en esperant-katalunaj renkontiĝoj “neniam-neniam” aŭ simple ĉeesti en la ludejo.

Sabato estis trankvila tago, plenplena da ekskursoj en la ĉirkaŭo de la gastejo kaj al Capellades, kie oni povis viziti la muzeon de la paper-muelejo aŭ simple resti en la kastelo, kuŝante kaj ripozante por la nokto.

Fine, la dimanĉa tago mallongiĝis rapide, ĉar ĝi estis la lasta. Matene, aro da viglaj ekskursantoj promenis tra la montaro kaj la plej junaj partoprenantoj organizis atelieron pri figuroj el argilo. Dume, laborgrupo restis ĉe la gastejo por kuir grandan paelon por tagmanĝi. La adiaŭo estis kiel kutime, malgaja; restis nur esperi, ke la venonta renkontiĝo okazos baldaŭ.

Mia takso, kiel unufoja organizanto de renkontiĝo, estas ege bona: mi multe lernis, ĝuis kun la etoso kaj ege kontentis vidante, ke la partoprenantoj foriris feliĉaj.

*Anna Raventós i Gascon*

***La nokton etosigis tri gvidantoj de infan-grupoj, kiuj organizis serĉ-ludojn por ridi kaj amuziĝi kune, tradiciajn inter skoltroj***

**La teksto celas plifirmigi fundamenton por la agado de KEA en la sekvaj jaroj: ĝi intencas klarigi multajn aspektojn pri la celo de esperantismo en la vigla, moderna kaj ŝanĝiĝanta kataluna socio**

**Propono de principaro**

**D**e jaroj pluraj aktivuloj sentis la bezonon de gvidprincipoj orientantaj la agadon de la asocio. La afero montriĝis tre malfacila, ĉar estis malfacile trovi la esencon de multaj ŝvebantaj ideoj, foje kontraŭdiraj, foje ne plu aktualaj, foje tro furoraj kaj eble tial rapide forpasontaj. Tiu-celaj laboroj komenciĝis jam antaŭ du jaroj kaj unua publika kunveno okazis en la printempa renkontiĝo de Canet, en marto 2006, sed la diskutoj turnis runde. Nur komence de 2007, instige de la plano por disvolvi asocian identecon de KEA, lanĉita de Guillem Sevilla kaj Rut Rovira, organiziĝis specifa tiucela laborgrupo. La skipon konsistigis Ferriol Macip, Gemma Armadans, Guillem Sevilla, Hèctor Alòs, Joan Inglada kaj Lluís Batlle. Ĝi publike prezentis sin en la pasinta printempa renkontiĝo de Vallgorguina, kie ĝi denove klopodis prisondi la opiniojn de

partoprenantoj, kaj entute interŝanĝis pli ol 200 retmesaĝojn dum la jaro.

Post kunveno, fine de septembro, la grupo pretigis malneton, kiu estis dissendita al la retlistoj de KEA kaj KEJ por diskuto. Kolektinte ĉefe tre favorajn sintenojn, ĝi estis tradukita en esperanton kaj la retgazeto *Libera Folio* prezentis ĝin la 28an de oktobro en artikolo titolita “Katalunaj esperantistoj pripensas siajn principojn”, kiu vekis viglan kaj interesan debaton en la gazeta retejo.

El la kritikoj kaj proponoj por plibonigo, la laborgrupo amendis la unuan malneton, kiu estis denove dissendita al la retlistoj. Fine, post la ricevo de la aprobo de la estraro, la malneton oni ĝin dissendas kune kun ĉi tiu revuo kiel proponon de dokumento aprobota de la venonta asembleo de KEA, la 1an de marto.

Entute la dokumento konsideras, ke la celo de KEA estas, unuflanke, instigi en la Kataluna Landaro la uzadon de la propra lingvo kaj de esperanto, kiel neŭtrala internacia helplingvo, kiel la plej bona eblo por lingva demokratio, garantianta la valorojn de la lingvaj rajtoj, de la lingva diverseco kaj de la rajto al plena komunikado inter homoj kun malsamaj lingvoj; kaj, aliflanke, diskonigi la katalunan kulturon en la mondo kaj aliajn kulturojn en la katalunlingvaj teritorioj. Ĝi konsideras, ke ekzistas tri bazaj asociaj valoroj, nome: la lingvaj rajtoj, komprenitaj kiel nedisigebla komplemento de la homaj rajtoj; la lingva diverseco, komprenita kiel esenca parto de la kultura diverseco; kaj la rajto al plena komunikado inter homoj kun diversaj lingvoj, kiel rimedo por venki la antaŭjuĝojn, survoje al packulturo. Fine, la dokumento disvolvas dek principojn, kiuj komprenigas la ligon inter tiuj valoroj.

La teksto celas plifirmigi fundamenton por la agado de KEA en la sekvaj jaroj: ĝi ne estas tiel strikta, kiel strategia plano –kiu devus esti ĝia logika sekvo–, sed ĝi intencas klarigi multajn aspektojn pri la celo de esperantismo en la vigla, moderna kaj ŝanĝiĝanta kataluna socio de la komenco de la 21a jarcento, kaj samtempe, eble montri vojon al aliaj esperanto-asocioj, por ke ili pli atentu, per konkretaj agadoj, la problemojn de lingvaj minoritatoj en la mondo. □



*Francesc Poblet, redaktoro de la revuo Lletres, prezentis ties budo de la pasinta Libro-Foiro de Frankfurto, kie la kataluna kulturo estas la honora gasto, kelkajn ekzemplerojn de la libroj El moviment esperantista a Mallorca kaj La komenca esperanto-movado en Katalunio, eble la solaj esperanto-libroj en la aranĝo.*

## Kaj Tiel Plu, en publika debato

La registara Instituto de la Kataluna Beletro (Institució de les Lletres Catalanes) organizis dum la pasintaj 28a kaj 29a de septembro konferencon pri poezio kaj kanto, konsistanta en kunvenoj kaj prelegoj pri literaturaj esprimoj nun- kaj ĉiu-tempaj. Pluraj el la plej elstaraj roluloj de la katalunaj beletro kaj muziko, kiel Maria del Mar Bonet, Pau Riba, Jaume Sisa, Quico Pi de la Serra, Joan Isaac kaj aliaj, riĉigis interesan programon, kie oni pritraktris temojn kiel la rilatojn inter poezio kaj muziko, la trobadorojn kaj la nuntempajn kant-aŭtorojn, la difinon de kanto kaj artisto, la lingvan diversecon kaj la poezion de la kanto aŭ la talenton kaj kreivon de la verkisto. Mirige, ankaŭ Kaj Tiel Plu estis invitita prezenti sian muzikon kaj nia ĉefkantisto Xavier Rodon, ankaŭ prezidis diskutrondon pri la lingva diverseco kaj la poezio de la kanto kune kun la elstaraj artistoj Maria del Mar Bonet, Juri Mikaeličenko kaj Josep Tero.

Kaj Tiel Plu impresis tiel bone, ke kelkaj ĵurnalistoj interesiĝis pri nia agado. Tiel tri membroj de la muzikbando estis invititaj partopreni la programon *icult.com* en COM Ràdio. Dum la unua parto de la intervjuo, oni plaĉe parolis pri ĉio ajn rilate al nia muziko kaj al nia lingva elekto. La programestro, kvazaŭ advokato de la diablo, klopodis diskuti iamaniere la strangan sed altkulturan agadon de Kaj Tiel Plu. Ĉio iris glate, eĉ dum la konektoj al ekstera ĵurnalista, kiu troviĝis en samtempa koncerto de Hombres G kaj poste en renkontiĝo de rokenrolaj motorciklistoj.

Dum la dua parto de la intervjuo eniris en la studion du geĵurnalistoj, kiuj klopodis kiel eble plej kontraŭstari. Tiam ni sukcese povis prezenti kaj esperantismon kaj nian idealon pri lingva ekologio. Estis facile respondeblaj frazoj kiel: “se tiu muziko, kiun vi faras iam malaperos, nenio okazos, samkiel se la kataluna lingvo malaperos, ankaŭ nenio grava okazos”, “mi parolas la anglan eksterlande kaj interkompreniĝas kun ĉiuj”, “esperanto celas malaperigi ĉiujn lingvojn”, “ni devus batali por defendi la hispanan, sed la kataluna malutilas, ĉar ĝi jam estas perdita”, “la okcitana lingvo malaperis antaŭ jarcentoj” ktp... Xevi Rodon klarigis, ke malaperis el la nuntempa penso (almenaŭ el tiu de la esperantistoj), tiu darvinismo asertanta, ke

fortaj lingvoj kaj kulturoj malaperigas la malfortajn. Siavice Ferriol Macip rebatis, ke esperantistoj taksas imperiisma la fakton konsideri kelkajn lingvojn internaciaj, aliajn naciaj kaj aliajn regionaj; male, esperanto estas taŭga kaj kohera solvo al ĉiesa interkompreno kaj donas al ĉiu homo, el kiu ajn socia klaso, la rajton komunikiĝi internacie. Sed verŝajne plej ŝatinda estis la diro de la programestro, favoranta nin en tiu momento, kiu asertis, ke li neniam anstataŭos la Ruĝan Libron el Montserrat per la lasta disko de David Bisbal.

Kvankam la celo estis paroli pri originala muzikbando, kiu interpretas siamaniere muzikon tradician, mezepokan, trubaduran, sefardan k.a. en la originalaj lingvoj kaj en la lingvo internacia, dum la lasta parto de la intervjuo, ĉefe pro la misinformoj de la du aldonitaj ĵurnalistoj, la intervjuo permesis la plenumon de la deziro de ĉiu esperantisto: la prezentadon de esperantismo kiel ekzistanta socia movado por homaj rajtoj.

*Ferriol Macip*

**Malaperis  
el la nuntempa penso  
tiu darvinismo asertanta,  
ke fortaj lingvoj  
kaj kulturoj malaperigas  
la malfortajn**



LLUIS ARAGAY

Mon Cardona kaj lia folkgrupo Sants & Fot ludis en Plaça del Rei de Barcelono la 26an de oktobro, okaze de la ĉiujara festivalo de tradiciaj dancoj. La grupo ĝuste fondiĝis en ĉi tiu placo 15 jarojn antaŭe. Ankaŭ Kaj Tiel Plu samloke koncertis, por la tria sinsekva jaro, la 16an de novembro.

**la rezultoj montriĝas  
tre kontentigaj  
kaj esperplenaj  
laŭ taksas Artur Trzewik  
en sia blogo**

**Aŭtomata tradukilo liverita**

**F**ine de la decembro, la Universitata Instituto pri Aplikita Lingvistiko, ligita al la universitato Pompeu Fabra, en Barcelono, finis sian interkonsentan laboron super du aŭtomataj tradukiloj el la kataluna kaj la hispana lingvoj en esperanton. La tradukilojn mendis la entrepreno ABC-Enciklopedioj antaŭ unu jaro kaj en tiu periodo grupo de la Instituto, kun la subteno de la Departamento pri Lingvoj kaj Komputadaj Sistemoj de la Universitato de Alakanto kaj de Kataluna Esperanto-Asocio disvolvis unuan version de la du tradukiloj.

La tradukiloj estas bazitaj sur la teknologio Apertium de la Universitato de Alakanto. Ĝi konsistas en aro de rimedoj por malprofunda tradukado, taŭga por similaj lingvoj. Tio signifas, ke la tradukiloj bazitaj sur ĝi ne faras ĝisfundan sintaksan analizon de la originala teksto –kio estas tre malfacila en la nuna stato de la aŭtomat-tradukada teknologio–, sed aplikas aliajn teknikojn produktantajn kontentigajn rezultojn, kiam oni tradukas inter lingvoj strukture similaj, ekz. inter du latinidaj lingvoj.

El komputika vidpunkto, la program-kodo estas libera kaj funkcias sur la operaciumo Linukso. Tiel do, kompetenta fakulo povas libere aliri la tekston de programoj kaj eventuale modifi ĝin por plibonigi aŭ adapti

al specifaj bezonoj. La libera programado fariĝis en la lasta jardeko eksterordinara rimedo por krei potencajn kaj senpagajn programojn por la plej diversaj bezonoj, danke al la kunlaboro de sennombraj disaj teamoj de fakuloj tra la tuta mondo. Tial, malferma sistemo, kiel Apertium, ŝajnas promes-plena investo, kaj la disvolvado de aŭtomataj tradukiloj per ĝi –almenaŭ el la latinidaj lingvoj en esperanton– ŝajnas trafa veto. Fakte, multiĝas la nombro de lingvoparoj, por kiuj Apertium estas uzata: nuntempe oni nombras 25, kvankam plurfoje temas pri variantoj de la sama lingvo (portugala kaj brazila, arana kaj okcitanaj).

Konkrete, la kataluna vortaro de la aŭtomata tradukilo atingas 15 000 vortojn, ĉefe komun-uzajn, dum la hispana vortaro superas 12 000. Por aŭtomata tradukilo por ĝeneralaj tekstoj tio ne atingas la dezirindan minimumon de 20 000, sekve necesas plu evoluigi la tradukilojn, kvankam, laŭ la kontroloj sur gazetaraj tekstaroj en la katalunaj kaj hispana lingvoj kun po unu miliono da vortoj (t.e. ĉ. po 2500 paĝoj da teksto), preskaŭ 90% de la vortoj apartenis al la vortaro de la tradukiloj.

Ankaŭ el la ne-leksikaj vidpunkto, la tradukiloj estas ankoraŭ nematuraj –ĉefe tiu el la hispana, por kiu la malfruigo de la livero de dulingva vortaro tre mallongigis la tempon de disvolvado de la modulo–, tamen la rezultoj montriĝas tre kontentigaj kaj esperplenaj laŭ taksas Artur Trzewik, respondeculo de la redaktilo Esperantilo, en sia blogo ([blog.esperantilo.org/?p=109](http://blog.esperantilo.org/?p=109)).

Post streĉa unu-jara laboro venas fazo, en kiu la tradukiloj estos unue instalitaj en la oficiala retejo de la projekto Apertium ([xixona.dlsi.ua.es/apertium](http://xixona.dlsi.ua.es/apertium)), kiun oni ankaŭ tradukos en esperanton. La sekva paŝo estos la transpreno de la projekto fare de teamo de Kataluna Esperanto-Asocio kaj ties testado kaj evoluigo fare de komputistoj kaj lingvistoj de la asocio. Eventuale, en 2009 oni entreprenos la starigon de tradukiloj en la inversaj direktoj. Entute, la revo de la teamo estus la disvolvado de reto de dulingvaj aŭtomataj tradukiloj inter esperanto kaj naciaj lingvoj, kiuj plifaciligus la efektivan uzadon de esperanto kiel pontolingvo en la reto. □



Xavi Batlle okupiĝis pri la polurado de la dulingvaj vortaroj de la aŭtomataj tradukiloj

## Bona amaskomunikila rikolto

**K**iel kutime, esperanto estis multe menciita en la katalunaj amaskomunikiloj, kutime kiel metaforo de monda interkomprenilo, sed ankaŭ ofte en rilato kun la laborista vivo de la komenco de la 20a jarcento. Ekzemple, ĝi estis menciita okaze de ekspozicio pri historio de anarkiismo en Barcelono aŭ de la 150a jardeveno de la fondo de la Korusa Societo de Terrassa, en kiu esperanto estis instruata. Ĝi aperis ankaŭ en recenzo pri la romano *La noia del ball* de Jordi Coca, kie la ĉefrolulo, anarkiisto, lernas esperanton antaŭ la milito, aŭ en artikolo okaze de la forpaso de la kinreĝisoro Antoni Ribas, kie en sceno de lia plej konata filmo, *La ciutat cremada*, grupo de liberecanaj laboristoj lernas esperanton kvazaŭ kaŝe. Eĉ Quim Monzó, en lia kutima kolumno en la gazeto *La Vanguardia*, la 11an de oktobro, ligis esperanton kun la laborista movado de antaŭ preskaŭ jarcento per frazo grandlitere reliefigita de la ĵurnalo: “La laboristoj estis tre lernemaj: ili starigadis ateneojn kaj tie lernis aferojn kiel esperanton”.

La internacia lingvo tre malfacile liberiĝas en nia lando de tiu ligiteco al la pasinto, tamen, danke al nia ĉefartikolo de la pasinta numero de *Kataluna Esperantisto*, Ferriol Macip kaj Hèctor Alòs (kun la telefona partopreno ankaŭ de Joan Català) estis invititaj al la programo L’Internauta de Catalunya Ràdio por babili dum unu horo pri la stato de esperanto en Interreto. La programo estis elsendita la 6an de oktobro, sed jam antaŭe aperis novaĵoj pri la retejo [klaku.net](http://klaku.net), lanĉita de aktivuloj de Kataluna Esperanto-Junularo, en la gazetoj *Vilaweb* kaj *Presència*, la 16an kaj 25an de septembro. Ankaŭ Xavier Rodon, Ferriol Macip kaj Anna Maria Sánchez estis intervjuitaj dum unu horo en la programo *Icult.com* de Com Ràdio, la 29an de septembro, okaze de la partopreno de la ensemblo Kaj Tiel Plu en konferenco organizita de la Institucio de la Kataluna Beletro. Siavice Joan Marimon estis intervjuita en tiuj tagoj dum duonhoron en Ràdio Tarragona, okaze de la nova lernoĵaro. Ĝuste la kursoj de esperanto en Tarragona estis anoncitaj en *Diari de Tarragona* dum tuta semajno kaj en la gazeto de la loka universitato Rovira i Virgili.

Gazetare, esperanto aperis plej elstare en la dua numero de novembro de la duonmonata junulara revuo *Cavall Fort*, kiu publikigis

dupaĝan artikolon pri ĝi kun la titolo “L’esperanto, una llengua internacional”. Tamen esperanto aperis ĉefe en rilato kun aliaj okazaĵoj. Reage al la amasbeatigo de 498 murditoj en la registara zono dum la hispana enlanda milito, Jordi Soler en opini-artikolo en la ĵurnalo *El Punt* de la 30a de oktobro kritikis la unuflankecon de la agado prezentante la figuron de pastro Joan Font Giralt, elstara esperantisto avertinta pri la danĝeroj de la faŝismo kaj naziismo, murdita de milicianoj en aŭgusto 1936, kiel ekzemplon de meritplena homo, kiu ne estis inkluzivita en la vaticanajn listojn de martiroj.

De alia viktimo de tiu milito, nome de la sindikatisto kaj komunista politikisto Andreu Nin –ankaŭ elstara tradukinto de Dostojevski al la kataluna–, aperis la libro *El jove Andreu Nin, textos periodístics* kun liaj fruaj ĵurnalismaj artikoloj publikigitaj en la gazeto *Baix Penedès* inter la jaroj 1905 kaj 1912. En tiuj artikoloj evidentiĝas lia tiutempa aktivado por esperanto, kiu estis reliefigita en la novaĵetoj pri la apero de la libro, i.a. en *El Punt* kaj *El 3 de vuit*.

Esperanto estis ankaŭ menciita en *Diari de Vilanova* la 14an de decembro en opini-artikolo titolita “El llatí llengua d’Europa”, en kiu la aŭtoro defendis latinon kiel internacian lingvon. La artikolo estis rebatita de Joan Inglada en la retgazeto *Vilanova Digital* kaj en la blogo de la esperanto-grupo de Vilanova i la Geltrú, kie okazis interesa diskuto pri la temo.

Plej aktuale, la vesperaj novaĵoj de Barcelona TV fermis sian elsendon de la 11a de januaro per tri-minuta intervjuo al Ferriol Macip. En rubriko, kie homoj rakontas pri siaj ŝatataj ĉevaletoj, la KEA-aktivulo estis enkonduke prezentita kiel ĵurnalisto de la okcitanlingvaj novaĵoj de la televid-elsendejo, kaj klarigis, ke lia intereso pri la okcitana, la eŭska kaj aliaj malplimultigitaj lingvoj nature devenas el lia esperantisteco. La intervjuo –inter la plej trafaj kaj sukcesaj por esperanto– turnis ĉirkaŭ la celoj de la internacilingva movado kaj ties nuntempa vikleco. □

**Esperanto estis ofte menciita en rilato kun la laborista vivo de la komenco de la 20a jarcento**

**La intervjuo en Barcelona TV staras inter la plej trafaj kaj sukcesaj por esperanto**



CLAUDIO OLIVARES

### **Zam-festo en Sabadell**

Dudek geesperantistoj el Sabadell, Ripollet, Sant Cugat kaj Barcelono kuniĝis dimanĉon la 16an de decembro en la restoracio “Mar-ko Polo” de Sabadell por festi Zamenhof-feston. Bona intergeneracia etoso, delikataj ekzotikaj pladoj, baldaŭa ekferiĝeto de plimulto... La vivo havas agrablajn momentojn.

*ec*

### **Koruso kantas en esperanto**

La 15an de novembro la koruso Heura de L’Hospitalet de Llobregat kantis la popolkanton Montaroj de Kanigo’ en la preĝejo Santa Eulàlia de Mèrida. La kanton oni filmis por inkluzivi ĝin en omaĝfilmon al la granda kataluna folkloristo Joan Amades, kies 50-jaran forpason oni rememoros en 2009. La elstara verkinto de la kvin-voluma Kataluna Kutimaro estis fervora esperantisto, prezidanto de Kataluna Esperantista Federacio kaj publikigis kolekton de katalunaj popolkantoj tradukitaj en esperanton, inter ili Montaroj de l’ Kanigo’, belege interpretita de la koruso Heura.

*mg / red*

### **Budo en L’Hospitalet**

Kataluna Esperanto-Fervoĵista Asocio, la pasintajn 15an kaj 16an de decembro disdonis propagandon de esperanto en budo starigita dum asoci-foiro en la ĉefa promenejo de L’Hospitalet de Llobregat.

*mg*

### **Enketo pri plurlingveco**

KEA septembre respondis al enketo pri plurlingveco lanĉita de Eŭropa Unio per Interreto. La demandaro interesiĝis pri la celoj de fremdaj lingvoj, pri ilia lernado kaj instruado, pri la uzado de lingvoj en entreprenoj, la uzado de lingvoj en la hodiaŭaj multkulturaj socioj, pri lingvoj kaj sociala integriĝo kaj pri la lingvoj en la institucioj de Eŭropa Unio. La respondo de KEA –sendita post diskuto en la asocia retlisto– substrekiis la gravecon de la uzado de la lokaj lingvoj en siaj teritorioj kiel esenca faktoro de socia kunligiteco, kaj de la neŭtrala lingvo esperanto por certigi la egalrajtecon inter la civitanoj, sendepende de ilia denaska lingvo.

### **Vizito al Linguamón**

Òscar Puig kaj Hèctor Alòs, nome de KEA, interparolis la 25an de oktobro dum unu horo kun Antoni Mir, direktoro de Linguamón. Linguamón estas nove fondita registara organizo, kun tre konsiderinda buĝeto, kiu specife prizorgas la lingvan diversecon, la daŭrigeblan disvolvon de lingvoj kaj la pacan kunvivadon de lingvoj. Inter ties plej ambiciaj programoj elstaras la fondo de lingvomuzeo en Barcelono la jaron 2010. KEA esploris diversajn kunlabor-formojn, i.a. en rilato al la prezentado de la planlingvoj en la muzeo. En baldaŭa estonto ni esperas konkretigi tiun kunlaboradon.

### **Eldon-furoro**

Post tre longa planado kaj replanado, en 2008 aperos la unuaj volumoj de la Kolekto Dalmau de KEA. Temos pri katalunlingvaj broŝuroj pri lingvaj temoj, kiuj permesos alproksimigi al la publiko esencajn elementojn pri esperanto. En la unua jaro oni planas la eldonon de tekstoj de kvar diversaj lingvis-



MARTI GUERREIRO

*La koruso Heura kantas la popolkanton Montaroj de Kanigo’*



toj: André Martinet, Umberto Eco, Claude Hagège kaj Robert Philipson.

Aliflanke, KEA eldonos novan dulingvan libron de Francesc Poblet pri la Universala Kongreso en Barcelono en 1909. Ĝi estos la daŭrigo de lia antaŭa verko pri la komenco de la esperanto-movado en Katalunio, kies formato ĝi daŭrigos, kaj kiu estos reeldonita, pro elĉerpiĝo. KEA publikigos ankaŭ malpli ampleksan studon de la sama aŭtoro pri la kongreso de Vinaròs de 1928.

Krome KEA decidis libroforme eldoni la esperanto-katalunan vortaron de Alòs kaj Carbonell, por faciligi ĝian uzadon kaj igi ĝin pli alloga. Per tio la asocio celas pli multe ĝin disvendi en budoj kaj librovendejoj al la ĝenerala publiko, anstataŭ celi ĉefe kurslerantojn.

Entute, do nia asocio planas eldoni ok novajn librojn kaj broŝurojn dum la jaro. Temas pri ambicia plano, tamen ĝi estas enkadrita en plurjara programo, kiu celas multobligi la kvanton de nacilingvaj tekstoj pri esperanto. Krome la plano prizorgas ankaŭ ties diskonigon: unuflanke per senpaga disdonado de dekoj da ekzempleroj al bibliotekoj –kio jam estas kutima asocia politiko de pluraj jaroj– kaj aliflanke zorgante pri ilia disvendado en normalaj librovendejoj kaj ankaŭ per la reto.

### **Kataluna Kongreso de Esperanto**

La 34a Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en Sabadell la 6an, 7an kaj 8an de decembro. La granda du-jara aranĝo de KEA estos ligita al la omaĝ-jaro al Jaume Viladoms, elstara pedagogo, politika aktivulo kaj esperantisto, kiu disvolviĝos en la urbo dum 2008.

La semajnon antaŭ la kongreso, okaze de la Internacia Jaro de Lingvoj, KEA organizos serion de prelegoj kaj rondaj tabloj kun elstaraj organizoj, por la vasta publiko. Oni planas tri-sesian aranĝon: en la unua partoprenus organizojn kiel Linguamón, Lingua-pax kaj CIEMEN, kiuj klarigus siajn aktivaĵojn kaj sian agadon por la lingva diverseco; en la dua partoprenus asociojn kiel Fundació per la Pau kaj Amnestio Internacia, kiuj klarigus kiel lingva diverseco estas ligita al paco; kaj en la tria partoprenus asociojn

de enmigrintoj en Katalunio kaj eventuale la Stud-Grupon pri Minacitaj Lingvoj de la Universitato de Barcelono, kiuj klarigus kiel lingva diverseco estas valora en nia socio kaj povas konserviĝi. Per tio KEA volas montri la sentemon kaj ligitecon de esperantistoj pri la lingva diverseco kaj la lingvaj rajtoj. Krome la aranĝo utilos por plifortigi rilatojn kun diversaj organizoj kaj asocioj por estontaj komunaj agadoj.

### **Kampanjo por nuligi honoradon al Franco**

Grupo de katalunaj esperantistoj iniciatis en novembro retan kampanjon kontraŭ la honorigo de la diktatoro Francisco Franco okaze de la Universala Kongreso okazinta en Madrido en 1968 sub la devizo “Por homa digno, ni petas nuligi la honoran prezidantecon de UK 1968 al la diktatoro Francisco Franco”. Per longa manifesto en la retejo [www.homadigno.net](http://www.homadigno.net), la iniciatintoj klarigis, ke “la jaron 1968 la Universala Kongreso de Esperanto okazis en Madrido kaj ĝia honora prezidanto estis Francisco Franco, puĉisto provokinta kruelan militon, diktatoro de Hispanio dum 39 teroraĵ-jaroj kaj ĉefa respondeculo pri ĉ. miliono da murdoj. La organizintoj de tiu UK tute forgesis, ke miloj da esperantistoj daŭre ne povis reveni al sia hejmlando kaj ke Franco masakris la esperantistan movadon en la hispana ŝtato. Siaflanke, UEA montris sian mankon de solidareco al la persekutita esperantistaro. Eĉ dum la kongreso, kelkaj programeroj ekzaltis la diktaturon kaj la diktatoron. La subskribantoj de tiu manifesto, esperantistoj vivantaj en la 21a jarcento, malfeliĉas pro la fakto, ke UEA daŭre havas en la listo de honoraj prezidantoj de siaj Universalaj Kongresoj, diktatoron respondecantan pri persekuto de esperantistoj, pri murdo de pli ol unu miliono da homoj, pri teroro, pri kruelo; kaj bedaŭras, ke la hispana esperanto-movado ankoraŭ neniel agis kontraŭstare al tiu insulto al homa digno.” Pro tio, ili lanĉis kolektadon de subskriboj por peti al UEA, organizinta la aranĝon, nuligi la honoran prezidantecon de la Universala Kongreso de 1968 al la diktatoro.

La agado havis grandan reeĥon en la retgazeto *Libera Folio*, kiu la 9an de novembro informis pri la kampanjo per novaĵeto kaj per reaga artikolo de la prezidanto de



*La 34a Kataluna Kongreso de Esperanto estos ligita al la omaĝ-jaro al Jaume Viladoms, elstara pedagogo, politika aktivulo kaj esperantisto, kiu disvolviĝos en Sabadell dum 2008*

***La subskribantoj la manifesto malfeliĉas pro la fakto, ke UEA daŭre havas en la listo de altaj protektantoj de siaj Universalaj Kongresoj, diktatoron respondecantan pri persekuto de esperantistoj kaj pri murdo de pli ol unu miliono da homoj***

UEA. En ĝi Probal Dasgupta defendis, ke, kvankam “estas tute kompreninde, ke esperantistoj kaj aliaj aktivuloj, kiuj zorgas pri la homaj rajtoj, revizitas la pasintecon kaj rekomprenas la eventojn surbaze de la nun kreskantaj socipolitikaj konscioj”, konsideris, ke la homoj defendantaj tiajn sintenojn “ne tute ĝuste taksas la disponeblon de energioj kaj ne tute ĝuste pritabelas la konkretajn prioritatojn por niaj laboroj”.

Al tiu starpunkto de UEA-postenulo sekvis pli ol 50 reagoj kaj re-reagoj, en kiuj estis diskutitaj diversaj aspektoj. Unuflanke, la vereco de la asertoj de la kampanjo, ĉar montriĝis, ke la esprimo “honora prezidanto” estis traduko el esprimo aperinta en la tiama bulteno de Hispana Esperanto-Federacio, dum la termino uzita en la tekstoj de UEA estis “alta protektanto”. Aliflanke, estis diskutita la signifo de la ago. Laŭ kelkaj la nuligo signifus “revizion de la historio” aŭ eĉ ties “falsigon”, dum aliaj subtenis, ke temus pri “rekonon de la okazaĵo kiel mispaŝo” kaj “morala kompenso” al la viktimoj de la diktaturo, i.a. al la esperantistoj, kiuj devis ekziliĝi post la milito kaj al kiuj la reĝimo malpermesis la partoprenon en la kongreso (kiel al la kataluno Eduardo Vivancos, subskribinto de la manifesto). Ĝuste en tiu rilato kaj al oponoj, ĉu entute indas diskuti pri okazintaĵoj preskaŭ 40 jarojn poste, leviĝis la ideo, ke necesas, ke iel “UEA serioze pripensu kaj starigu klarajn principojn por ne transiri liniojn, kiuj pli mal-helpas ol helpas sian agadon”.

Malan opinion defendis Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA en dua artikolo en *Libera Folio*, aperinta la 14an de novembro. Laŭ li Franco ne estis honorigita, sed “eksploatita”. Tiu sinteno estis kvazaŭ vangofrape sentita de la subtenantoj de la manifesto kaj vekis novan ŝtormon de reagoj – pli ol 40–, en kiuj oni povis kompreni, ke Buller estis informita de kelkaj monatoj, ke oni preparis similan agadon, sed tute ne reagis. Kvar tagojn poste, la historiisto Ziko van Dijk, aŭtoro de doktora tezo pri la historio de UEA, defendis per nova artikolo en la sama retgazeto la opiniojn de Osmo Buller kaj provis argumenti ilin per historiaj donitaĵoj –kvankam kelkaj el ili

montriĝis dubindaj, laŭ la sekva vico de dekoj da reagoj.

Ankaŭ diversaj blogoj reagis al tiu longa diskutado, kiel tiuj de Loren Mitchel aŭ de Pere Quintana. Kelkaj reagoj estis rekte insultaj, kiel tiu de David de Ugarte, kiu pretendis, ke la lanĉintoj de la manifesto estas “filoj de riĉaj familioj [...] gajnintaj la militon”, kiuj pro tio havas “kulpan konsciencen”. Krome kelkaj homoj konsideris, ke la iniciato estis misuzita de kontraŭuloj de UEA, kaj aparte de la organizaĵo La Civito.

La manifeston ĝis januaro subskribis –foje kun sedoj pri ties vortumo– ĉ. 150 homoj kaj 20 asocioj, i.a. KEA, KEJ, Majorka Esperantistaro, Centro de Esperanto Sabadell, Vilanova Esperanto-Grupo, Grup d’Esperantistes de la Plana, Kaj Tiel Plu kaj la Plenumkomitato de SAT, kiu sendis leteron kun propra motivado al UEA.

---

***La prezidanto de UEA plurfoje tre trafe intervenis kaj montris sian pretecon rekte diskuti kun la lanĉintoj de la manifesto interkonsenton kontentigan por ĉiuj***

---

La diskutoj fakte montriĝis ne nur viglaj, sed ankaŭ interesaj kaj la prezidanto de UEA, plurfoje tre trafe interveninte, montris sian pretecon rekte diskuti kun la lanĉintoj de la manifesto interkonsenton kontentigan por ĉiuj.

***Institut d’Estudis Occitans***

Ferriol Macip kaj Josep Maria Milla fariĝis membroj de la nov-fondita sekcio de Institut d’Estudis Occitans en Katalunio, el kiu Macip estis elektita sekretario. La organizo havas la samajn celojn de Institut d’Estudis Catalans, t.e. kaj tiun de akademio de sciencoj kaj tiun de lingvo-normiga instituto. En la lastaj jaroj kataluna filio montriĝis pli kaj pli necesa por eviti politikan misuzon de la lingvo fare de politikistoj, kaj tiu konstato plifortiĝis post la aprobo de la nova Statuto de Aŭtonomio de Kata-

lunio, per kiu la okcitana fariĝas la tria oficiala lingvo de Katalunio en ties tuta teritorio –kaj ne nur en Aran-valo, kiel de post 1979. Macip kaj Milla estas de multaj jaroj ligitaj al la okcitana lingvo kaj de tri jaroj okupiĝas pri la semajna novaĵ-programo en la okcitana en Barcelona TV.

***Laborgrupo por la lingvojaro***

Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2008 Internacia Jaro de Lingvoj. Por iniciati kaj kunordigi diversajn agadojn dum tiu jaro la estraro de Universala Esperanto-Asocio elektis specialan laborgrupon, sub la gvido de la vicprezidanto Rainiero Clerici, en kiu partoprenas la prezidanto de KEA, Josep Franquesa.

***Zamenhof-bankedo en Malto***



Danke al familia malavareco, ni povis ĉijare viziti Malton turismcele kaj bankedi dimanĉe la 16an de decembro kun la tieaj delegitoj de UEA kaj kelkaj aktivuloj gvidataj de la prezidanto de Malta Esperanto-Societo, la konata poeto Carmel Mallia kaj ceteraj familianoj kaj akompanantoj ne esperanto-parolantaj, ĝis entute 60 ĉeestantoj. Ĉe la deserto okazis libro-donac-interŝanĝo kaj mi dankis la ĝentilan akcepton de la malmultaj, sed tamen fervoraj samideanoj.

*Llibert Puig*

## Progresantoj: Ajò Sardigna

**E**n la okuloj de lingvemulo, la beleco de Sardio –ankoraŭ ne tro tuŝita de la konstruado– aspektas ligata al la lingva riĉeco de Sardio, ĉar ĝi estas la sola insulo de la Mediteraneo en-havanta kvar lingvojn, ĉiujn latinidajn.

En la nord-orienta parto de Sardio, kun Tarranóa [Olbia] kaj Tèmpiu [Tempio] kiel ĉefaj urboj, estas parolata korsa **dialekto**, nome la galura. En la nord-okcidenta parto, en Sàssari [Sassari] kaj Pòlthu Tòrra [Porto Torres] estas parola trans-ira **dialekto** –la sasara– ankaŭ apartenanta al la korsa grupo sed kun forta influo sur la vortaron fare de la sarda. Ambaŭ **dialektoj** estis portitaj de la korsoj dum la 16a, 17a kaj 18a jar-centoj pro la sen-popoligo de regionoj post akraj militoj kaj **epidemioj**. Tiuj **dialektoj** estas parolataj de proksimume 200 000 homoj, kiuj plej-multe ne scias, ke ilia lingvo estas la korsa.

Du jar-centoj antaŭe, estis portita ankaŭ la katalunan en la insulon. Ĝi ankoraŭ plu estas parolata en la urbo Alger [Alghero], kiu estis repopolita per katalunoj en la jaro 1372, sed restas ankaŭ ĝia **influo** sur aliajn lingvojn de Sardio. Kiel ekzemploj de tio estas la vortoj: “cara”, “gana”, “grogu”, “sindria”, “caglià” (katalune: *callar*) el la galura aŭ “arreu”, “banduleri”, “callasciu” (kat.: *callaix*), “jaju, jaja” (kat.: *iaio, iaia*) kaj “ulleras” el la sarda. Nun, malpli ol kvarono de la urbanoj (10 000 homoj) parolas la katalunan en Algero, malgraŭ ke la sento pri ligiteco al la kataluna lingvo estas ĝenerala.

Sed la sola lingvo de Sardio, kiu naskiĝis en la insulo estas la sarda. Lingvo, kiu jam de la dua duono de la 14a jar-cento, komencis suferi la premon de la regantaj lingvoj: unue la kataluna, due la hispana kaj fine la itala. Male, la aparteco de la insulo ebligis konservi ecojn, kiuj estigis la sardan, kiel la plej proksiman lingvon al la latina, speciale la nuoran, kiu kun la kapidana kaj la logudora formas la sardajn **dialektojn**. Tiuj estas sufiĉe malproksimaj inter si, pro tio ĝis la **normigo** de la lingvo fare de la regiona registaro (*Limba sarda unificada*, 2001) ne ekzistis unueca skribado



**dialekto:** Formo de lingvo parolata en regiono

**epidemie:** Malsano trafanta grandan parton de loĝantaro

**influo:** Efiki sur alian personon

**favore:** Prezente bonan efikon

**normigo:** fiksado de inter-konsentitaj reguloj

Fine, estas la tabarkina, **dialekto** de la ligura parolata de 15 000 homoj en la vilaĝo U Pàize [Carloforte] de la eta insulo Sankta Petro kaj en la vilaĝo Càdesédda [Calasetta] de la insulo Sankta Antioĥo, apud la suda mar-bordo de Sardio, kie al-venis la ĝenovanoj de-venantaj el Tabarko (arabe: *طبرق*), tunizia urbo proksima al Alĝerio regita de ĝenovanoj ekde 1553 kaj okupita de la tunizianoj en 1741, pro kio la tabarkanoj devis foriri.

Ĉiuj ĉi lingvoj kaj **dialektoj**, estas parolataj ankoraŭ nun en familiaj rondoj kaj en pluraj vilaĝoj, sed la trans-dono de la lingvo al la junuloj inter-rompiĝis post la dua mond-milito. Ĝenerale, la junuloj nur uzas tipajn esprimojn de la lingvo de siaj patroj por konservi nur ian ideon pri ‘lokismo’, kio montras, ke la lingva anstataŭado rapide akriĝis **favore** al la itala. Unu el tiaj esprimoj estas la sarda vorto “ajò!” (“aiò!” en la corsa) signifanta “ek!”. Tamen, tiu “ek!” estas neniu voko al revivigo de la sardiaj lingvoj, ĉar eĉ la regiona registaro malmulte agas kontraŭ tiu stato.

Gerard Escuer



## Interreta anguleto

**E**n la interreta mondo ĉio ŝanĝiĝas vertiĝe. En la fina jardeko de la pasinta jarcento, la reto proponis nur primitivajn retpaĝojn kaj limigitan retpoŝtadon. Por esperantistoj eblis tiuepoke nur uzi forumojn laŭ sistemo Usenet, kiel la veterana soc.culture.esperanto. Sed iom post iom grandskale multobliĝis la dissendolistoj, por kies partopreno oni ne bezonas konektiĝi al Usenet-serviloj. Poste aperis la blogoj, kvazaŭ personaj memolibroj. Kaj nuntempe furoras la tiel nomataj sociaj retejoj. Partopreni en centoj da esperantaj forumoj kaj sociaj retejoj kaj vizitadi abundegan provizon de individuaj blogoj de esperantistoj fariĝis komplika tasko. Tiuj novaj iloj, eĉ intereseĝaj, riskas dezertiĝi la klasikajn, ĉar multaj esperantistoj antaŭe fervore partoprenantaj en forumoj migras al la novaj sistemoj.

En la pasinta numero de *Kataluna Esperantisto* mi menciis la sukcesan retejon [klaku.net](http://klaku.net), fondita de aktivaj katalunaj esperantistoj. Hodiaŭ mi referencas al la esperanta fako de nova socia retejo Ipernity. Laŭ la kreinto de tiu fako, Paul Peeraerts, komence de 2008 jam membris en ĝi ĉirkaŭ 450 esperantistoj. Ĝi enhavas jam pli ol 1300 artikolojn rilatajn al nia lingvo: [www.ipernity.com](http://www.ipernity.com).

Aperis eksperimenta aŭtomata tradukilo kataluna-esperanta kaj hispana-esperanta. Ĝin kreis la Universitata Instituto pri Aplikita Lingvistiko de la universitato Pompeu Fabra de Barcelono. Aldone al la menciitaj paroj ĝi subtenas la lingvojn galegan, portugalan, francan, anglan kaj okcitanan. Ĝi atingebblas per: [xixona.dlsi.ua.es/apertium-unstable/ca](http://xixona.dlsi.ua.es/apertium-unstable/ca)

Monda Kalendaro havas nun novan allogan aspekton kaj pliajn eblojn: [www.mondakalendaro.org](http://www.mondakalendaro.org)

La paĝo de la Iberia Renkontiĝo 2008 en Benicàssim troveblas en: [www.esperanto.cat/ir2008](http://www.esperanto.cat/ir2008)

Karles Berga subtitoligis en esperanto filmeton pri la kataluna modernismo pretigitan de lernejoj de la mezlernejo Arraona el Sabadell: [www.dotsub.com/films/elmodernisme/index.php?autostart=true&language\\_setting=eo](http://www.dotsub.com/films/elmodernisme/index.php?autostart=true&language_setting=eo) 1647

La retejo Alexa listigas la plej popularajn retpaĝojn pri esperanto: [www.alexa.com/browse?&CategoryID=486](http://www.alexa.com/browse?&CategoryID=486)

La paĝaro [www.gazetejo.org](http://www.gazetejo.org) listigas kaj ebligas la elŝuton de multaj esperantaj gazetoj, inter ili *Kataluna Esperantisto*. Lastatempe ĝi aldonis al sia kolekto novan belan revuon en nia lingvo: *La Karavelo*, eldonitan en Portugalio por popularigi la literaturon de tiu lando: [www.gazetejo.org/lakaravelo](http://www.gazetejo.org/lakaravelo)

Tabelo de esperantaj vortoj, kiuj povas simple anstataŭi foje necesajn neologismojn, kreita laŭ la gvido de Anna Löwentstein kaj Renato Corsetti, troveblas en: [www.bonalingvo.it/index.php/Simplaj\\_samsignifaj\\_vortoj](http://www.bonalingvo.it/index.php/Simplaj_samsignifaj_vortoj)

La Akademio de Esperanto decidis enretigi la aktojn pri siaj decidoj, konsultoj kaj rekomendoj. Jam videblas la aktoj 1 kaj 2, kaj baldaŭ videbliĝos la aktoj 3, ekde 1968 ĝis la nuntempo: [akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj1](http://akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj1) kaj [akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj2](http://akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj2)

*Darío Rodríguez*

## Ĝisdatigo de la esperanto-instruado

*En la nuntempo oni vidas, ke la sociaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis tiel, ke la tradicia kalendaro por la kursoj –oktobro ĝis majo (aŭ junio)– ne estas taŭga.*

*Unuflanke, la interesitoj hazarde prezentiĝas longe de la tuta jaro. Aliflanke, ĉu pro laciĝo, ĉu pro familiaj aŭ profesiaj devoj, ili ne emas engaĝiĝi por tiel longa periodo aŭ simple ne (plu) partoprenas la lernadon. Eĉ por la instruisto mem la tempo-investo povas esti tro postulema.*

**J**am de du jaroj, en Amikoj de Unesko ni komencis provi novan skemon kaj la rezultoj ĝis nun estas kuraĝiĝaj. La ŝanĝo 'kurso' estas tia: en difinita tago de la semajno oni klasas dum du horoj kaj tio ripetiga dum ses sinsekvaj semajnoj. Dum la lernojaroj ni kombinas komencajn kaj daŭrigajn kursojn kun interaj ripozperiodoj.

Unuavide oni povus kredi, ke dekdu horoj estas malmulta tempo, sed la praktiko montras, ke fine de la (komenca) kurso la lernantoj akiris sufiĉe bonan nivelon. Kompreneble, ĉiu laŭ sia propra kapablo.

Nova metodiko supozeble kontribuis al la sukceso. Temas ne pri invento, sed pri meditata kombino de la plej taŭgaj eroj de ekzistantaj metodoj plus aldono de kelkaj novaj ekzercoj naskitaj de la propra inventemo. La lernantoj de komenca kurso finiĝinta antaŭ ne longe jam demandis pri triagrada nivelo!

Ni planas rakonti pri la metodiko mem en onta artikolo.

*Ramon Perera*

ve de la portada

# Trilingüisme sostenible?

**Q**ue la diversitat cultural, i en particular la lingüística, és un patrimoni que convé preservar, difondre i valorar és una qüestió sobre la qual pocs tenen reserves. El debat rau en com conservar-la i les polítiques a aquest efecte es basen sobre perills que no tothom valora de la mateixa manera. Si el concepte general de defensa de la diversitat lingüística pot ser assumit per tothom, és clar que les formes d'actuar no són les mateixes, posem per cas, per a diferents partits en el cas concret del català en tot el seu àmbit lingüístic. Entre les diferents polítiques lingüístiques podem observar tendències equivalents a les que trobem en economia: lliurecanvistes i proteccionistes, partidaris d'una economia totalment liberalitzada o d'una ben planificada. Com és, però, el mercat lingüístic al món?

Al món, segons la majoria de les estimacions, hi ha entre cinc mil i sis mil llengües. L'1% són parlades pel 80% de la població mundial, de manera que el 20% de la humanitat parla el restant 99% de les llengües del món. Tenim, doncs, una distribució totalment esbiaixada dels recursos, de la riquesa lingüística. La força de les llengües, però, no ve donada tant per la seva importància demogràfica, sinó per l'econòmica: l'anglès, llengua primera d'uns tres-cents milions de persones, té una predominança clarament per damunt del mandarí, amb més del doble de parlants com a llengua materna. Alhora, les hegemonies lingüístiques van aparellades també a les econòmico-militars: l'anglès va substituir el francès, com aquest havia substituït abans el llatí. És probable, si no hi ha un canvi de paradigma, que triguem dues o tres generacions a veure com el xinès s'imposa a l'anglès –ja està començant a agafar un terreny considerable en estats limítrofs com Rússia i l'Àsia central.

L'anglès, però, no és monopolístic. Si analitzem el seu pes econòmic, el pes per exemple de les seves publicacions, és considerable, però el seu percentatge es redueix –excepte, potser, en el capítol d'edicions acadèmiques (on, per cert, el xinès ja comença a agafar

posicions). L'economia lingüística és un oligopoli: unes quantes llengües abasten la quasi totalitat del mercat. En aquest aspecte, podem considerar que en el camp de les llengües, l'educació a Catalunya està sucumbint a la pressió oligopolista de dues llengües hegemòniques: el castellà i l'anglès.

